

Venontaj eventoj

Jen la plej aktualaj planoj de eksterkursaj eventoj: prelegoj, ekskursoj, ktp. Planojn, kiuj ankoraŭ ne estas definitivaj, markas demando-signo (?).



Lundo (hodiaŭ)

- ★ **8:30 atm:** Enkonduko. Renkontiĝu antaŭ via loĝejo. Ni montros al vi la vojon al la klasĉambroj kaj la lingvolaboratorio.
- ★ **9:30 atm:** Vizito al la lingvolaboratorio
- ★ **10:00 atm – 12:20 ptm:** Lecionoj
- ★ **2:00 ptm:** Promeno tra la universitato kaj ricevo de studentaj kartoj. Renkontiĝu antaŭ la loĝejo.
- ★ **7:30 ptm:** Interkona Vespero. Neformala kunveno por ekkoni unu la alian. Renkontiĝu en la komuna salono en Cuzco (ĉe la teretaĝo).

Mardo

- ★ **1:30 ptm:** Promeno al la glisilejo apud UCSD. Renkontiĝu antaŭ la loĝejo. Post 15 minutoj da piedmarŝado, ni atingos klifojn de sur oni lanĉas glisilojn (senmotorajn aviadiletojn) super la maron. Poste, se oni volas, ni grimpos malsupren al la plaĝo *Black's Beach*.
- ★ **7:30 ptm:** Katalin prezentos informon pri ekzamenoj por tiuj, kiuj volas ricevi atestilon de lingvokapablo laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro. La ekzamenoj okazos ĉi tie, la 5-an de julio.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Asante n-ro 116
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko aperas lunde – vendrede dum la kursaro. Kutime ĝi aperas tagmeze. Se vi ne ricevas ĝin post la matenaj klasoj aŭ en la manĝejo, prenu ekzemplon el la skatolo sur la fenestro de la redaktejo!

Ni avide atendas viajn artikolojn, fotojn, desegnaĵojn, bildstriojn, poemojn, viajn am-leterojn... preskaŭ ion ajn! Memoru, la Fasko estas taggazeto **por vi kaj pri vi**: viaj verkoj igas ĝin interesa. Do nepre kontribuu!

Se vi ne sentas vin komforta pri verkado, ne timu; ni volonte helpos vin korekti kaj poluri. Se vi estas en la meznivela klaso, serĉu unu el niaj help-redaktistoj; sur siaj nomŝildoj ili portas specialajn glumarkojn kun rideto (☺) – ili ridetante helpos vin korekti, poluri, kaj plibonigi vian verkon. Kiam la verko pretas, sendu ĝin per retpoŝto al la adreso supre, aŭ simple portu ĝin piede al la redaktejo.

Salutmesaĝo de la administranto



Ellen EDDY administras nian kursaron. Se vi havas por ŝi demandojn aŭ se vi bezonas helpon, vi povas atingi ŝin telefone per 206-300-9724, rete per <eddyellen@aol.com> aŭ en la loĝejo Cuzco, n-ro 117.

Saluton al NASK-anoj de 2010. Mi jam korespondis kun ĉiuj sed estos bonege renkonti vin persone. Mi administras la programon kaj mi loĝas inter vi en apartamento n-ro 117 en Cuzco. De tempo al tempo je la komenco estas etaj problemoj aŭ miskomprenoj. Mi ofte povas facile solvi ilin se oni nur petos helpon. Do ne hezitu! Mi esperas ke via restado estos ĝuiga kaj vi portos multajn bonegajn spertojn kiam vi reiros hejmen.

Greetings to the 2010 NASK members. I have already corresponded with everyone but it will be great to meet you in person. I am the administrator of the program and live among you in apartment 117 in Cuzco. From time to time, at the beginning, there are little problems or misunderstandings. I often can easily solve them if a person just asks for help. So don't hesitate. I hope your stay will be enjoyable and that you take many great experiences home with you.

Konsiloj por novaj NASK-anoj

Lee MILLER estas multjara veterano de NASK, kiu en 2010 instruos en la meznivela kurso.

Bonvenon al NASK 2010! Post pluraj monatoj de planado, jen venis la tempo por la NASK-kursaro de 2010. Ni feliĉe



trovas nin en la belega tereno de UCSD en San Diego, kie la suno brilas, la vetero belas, kaj unufoje en ĉiu jaro aperas malgranda parto de Esperantujo.

NASK estas tre unika kursaro. Ĝi donas al vi tri semajnojn de studo, lingvolernado kaj lingvouzado, kaj amuzo. Malofte oni povas pasigi tiom da tempo inter aliaj Esperanto-parolantoj... tial gravas konscii ke ĉiu momento estas okazo por aŭskulti kaj paroli la lingvon. Eĉ se vi taksas vin ne tre kompetenta, partoprenu lecionojn kaj konversaciojn, kaj parolu kuraĝe.

Multaj homoj lernas Esperanton sen kurso kaj sen instruisto. Oni povas bone lerni la gramatikon kaj vortostokon, oni povas legi kaj skribi, oni povas uzi la lingvon per Interreto... kion oni ne povas fari hejme, sole, estas sperti la aktivan ĉiutagan uzadon de Esperanto. Tio, do, estas unu el niaj ĉefaj celoj por NASK.

Foje homoj timas paroli, timas fari erarojn, timas malfermi la buŝon kaj diri ion en nedensklingvo. Mi diru, ke vi plene rajtas silenti. Sed mi esperas ke vi forpuŝos iomete iujn timojn, kaj fidus ke la grupo tute bone akceptos vin, eĉ kun eraroj! Neniu parolas perfekte, erari estas home, kaj oni bezonas erarojn por vere progresi en lingvolernado.

Nu, ĝuu la tri semajnojn ĉi tie. Estas multo por vidi kaj fari en la universitato kaj en la regiono. Se vi bezonas helpon, demandu. Se ion vi ne komprenas, petu klarigon. Se aperos problemoj, bv. informi iun (Ellen, Grant, Hoss, aŭ min) kaj ni provos solvi ĝin. Kaj ĉiam, ĉie, parolu en Esperanto kaj vidu kiom rapide vi progresos.

Welcome to NASK 2010! After several months of planning, the time is here for the summer Esperanto courses of 2010. It's great to be on the beautiful campus of UCSD, where the sun shines, the weather is beautiful, and once a year a small Esperanto community appears.

NASK is a very unique course. It provides you three weeks of study, language learning and language use, and fun. It's not very often that we have the chance to spend this much time with other Esperanto speakers... and it's important to be aware that each moment is a chance for you to hear and speak the language. Even if you don't think you're very skilled, get involved in the lessons and conversations, and be courageous enough to speak out.

Many people learn Esperanto without a course and without an instructor. It's possible to learn the grammar and vocabulary well, to read and write, and to use the language via the Internet... what it's not possible to do at home, alone, is to experience the active daily use of Esperanto. That, then, is one of our main goals for NASK.

Sometimes people are afraid to speak, afraid to make errors, afraid to open their mouth and say something in a language other than their first. And you certainly have the right to keep quiet. But I hope that you'll push any fear aside, and trust that the group will accept you just fine, even with errors! No one speaks perfectly, to err is human, and you actually need to make errors if you want to make progress in language learning.

So, enjoy your three weeks here. There's a lot to see and do both on campus and in the region. If you need help, ask. If there's something you don't understand, ask for clarification. If you have a problem, let us know (Ellen, Grant, Hoss or me) and we'll try to solve it. And always, everywhere, speak Esperanto, and see just how rapidly you move forward.

Salutmesaĝoj de kelkaj niaj instruistoj

D-ro Katalin KOVÁTS instruos en la meznivela kurso. D-ro Grant GOODALL instruos en la altnivela kurso.



Post po du NASK-oj en Sanfrancisko kaj Vermonto mi volonte kaj scivole venis instrui ankaŭ al Sandiego. Allogis min la tasko, la renkontiĝoj kun novaj kaj malnovaj amikoj, la famo de Kalifornio, suno, blua ĉielo. La unika eblo dum tri semajnoj loĝi kaj labori kune inspiras min al novaj ideoj, kreado de pliaj materialoj, elpensado de novaj instruistaj taktikoj, kiujn mi planas elprovi eksperimentante pri vi.

Kiel vi vidas, miaj gepatroj jam je mia naskiĝo sciis, ke mi okupiĝos pri instruado de Esperanto kaj estos freneza pri la uzo de akuzativo. Ili nomis min KataliN. Do, mi ne povas ne promesi al vi ankaŭ ĉi tie fari mian akuzativ-mision.

Mi instruos kun Liĉjo en la dua nivelo, kie ni planas plifirmigi viajn konojn pri gramatiko kaj lingvouzo. Ni enkondukos vin en la movadon, malkovrante kun vi Esperanto-aranĝojn kaj kulturajn valor-

aĝojn, tradiciojn kaj organizajn flankojn de la verda movado. Ni planas kune legi ankaŭ krimromanon, studi per programitaj materialoj, fari multajn paroligajn ekzercojn, vidi filmojn, elprovi ekzercojn de edukado.net, kies redaktoro mi estas. Krom la formalaj lecionoj mi ŝatus prezenti al vi la novan version de la paĝaro edukado.net, kiu havos sian premieron verŝajne dum nia kursaro. Se vi interesiĝas, mi povas prelegi al vi pri la fama pentristo Vincent van GOGH, pri lia vivo kaj arto; pri Andreo CSEH kaj lia metodo; pri kelkaj eldonaĵoj de Esperantujo, retejaj komunumoj kie esperantistoj aktive agadas, kaj mi havas ankaŭ kelkajn surprizajn, malseriozajn temojn.

Tamen mia “plej ŝatata ĉevalo” lastatempe estas tre, eĉ tro serioza temo, nome la novtipaj ekzamenoj. Mi proponas al vi eluzi la unikan eblon kaj trapasi ĝin por akiri kvarlingvan ŝtatan atestilon pri viaj konoj pri Esperanto.

Krom la supre listigitaj temoj kaj aktivaĵoj mi pretos helpi vin spertiĝi en la uzo de Esperanto, do ne hezitu peti helpon,

“mendi” ekzercojn kaj terapiojn pri ajna temo kaj problemoj.

Kun la espero efike kaj bone eluzi nian kuneston kaj la kursotempon kore bonvenigas vin ĉiujn: KataliN.

Karaj gelernantoj, bonvenon al San Diego kaj bonvenon al NASK! Mi treege ĝojas ke vi estas ĉi tie kaj mi esperas ke vi ĝuos vian tri-semajnan restadon en tiu ĉi angulo de Esperantujo. Mi instruos en la supera nivelo (12), sed mi esperas ke mi ankaŭ povos konatiĝi kun la lernantoj en la meza nivelo (5C).

Mi mem estis lernanto en NASK antaŭ jaroj, kiam William AULD kaj Tacuo HUGIMOTO estis instruistoj. Tio estis neforgesebla sperto por mi, kaj mi faros mian eblon por ke via sperto ĉi-jare estu simila. Ni havas bonegan teamon de instruistoj kaj gastprelegantoj, do atendas vin tre riĉa kaj varia programo. Profitu ĝin!



Novaj vendej(et)oj proksimaj

Dum la pasinta jaro aperis du novaj vendejoj tre proksimaj al ni. Ĉar ili estas novaj, ili ne aperas en la manlibro, kiu troviĝas en nia retpaĝaro.

La vendejoj ne havas grandajn stokojn, sed haveblas sapo, ŝampuo, ĉokolado, trinkaĵoj, ktp. La plej proksima nomiĝas *ShortStop* – ĝi situas en la konstruaĵo *RIMAC Annex*, iom oriente de ni. Por atingi ĝin, sekvu la vojon al la manĝejo *Café Ventanas* sed turniĝu dekstren kaj supreniru

laŭ la ŝtuparo. Ĉe la supro, iom maldekstre, vi trovos ĝin.


La dua estas *The Village Place & Market*, ĝuste preter la manĝejo je la maldekstra flanko de la strato *Scholars Drive North*. Jen la horoj:

- ★ *The Village Place & Market*
lunde – vendrede: 7 atm – noktomezo
- ★ *ShortStop*
lunde – vendrede: 8 atm – 6 ptm
sabate, dimanĉe: 11 atm – 6 ptm

Serĉu vian lingvo-helpanton

Mi instigas vin ĉiujn kontribui ion al la *Fasko*, eĉ se vi ne sentas vin sufiĉe memfida verki senhelpe. Ĉi-jare mi petis helpon de lernantoj en la altnivela klaso. Serĉu ilin per la rideto sur la nomŝildoj. Ili kunlaboros kun vi por korekti bazajn erarojn, doni konsilojn pri vortelekto kaj gramatiko, kaj finfine poluri ĉion.

Kaj se vi volas iĝi helpanto, bonvolu kontakti min! – Hoss (la redaktisto)



Jen la regiono ĉirkaŭ niaj loĝejoj. Malsupre de la mapo trovi la loĝejojn *Cuzco* kaj *Asante*. Por vespermanĝi dimanĉon, ni sekvis vojon (la supran punkto-linion) al la manĝejo *Café Ventanas*. Sekvu la saman vojon por atingi la vendejon *ShortStop*, sed anstataŭ turniĝi maldekstren, turniĝu dekstren kaj supreniru laŭ la ŝtuparo (laŭ la supra streketo-linio).



Du apudaj vendejoj: *The Village Place & Market* (supre), *ShortStop* (sube)

